

La defalo de la dioj

Komento pri la Evangelio de la 33-a dimanĉo de la ordinara tempo
(publikigita en la numero 79 de la revuo Adista)

Devis ŝajni neeble ke tiel grandioza kaj majesta konstruaĵo kiel tia de la Jerusalema Templo, la plej granda sankta tereno dum la romia epoko, kaj unu el la arkitekturaj mirindaĵoj de la plej fora antikveco, havus jam elnombritajn vivtagojn. Jesuo anoncas la finon de tiu institucio post la konstato pri ties defalo, kiel rememoras la epizodo pri la ofero de la malriĉa vidvino per kiu komenciĝas la 21a ĉapitro de la Evangelio laŭ Sankta Luko. Ĝi estis religia institucio kiu, anstataŭ prizorgi la vidvinojn kaj la orfojn, kiel ordonis la Dia leĝo (vidu Readmono 14,19; 26,12) sin vivtenis je iliaj elspezoj senigante ilin de iliaj havaĵoj en la nomo de la Plejalta Dio, tiu devis finiĝi kiel eble plej baldaŭ. Sed la defalo de Jerusalemo kaj de ĝia Templo estos nur la komenco de iu liberiga procezo kiu alportos la homan historion al ĝia plena alvenpunkto.

La ĝenerala kaj ofte drama renverso, kiun tia procezo kunportos kun si (militoj, revolucioj, tertremoj, malsatmizeroj, pestepidemioj) tiuj estos la peza konstato pri kiom da malhomaĵo tiaj religiaj, politikaj kaj sociaj sistemoj entenis en sia eno. La krizo utilis por senmaskigi ilian veran naturon: malantaŭ ŝajno je religio, povo kaj brilo sin kaŝas la perforto, la trouzo kaj la ekspluatado.

Jesuo antaŭanoncas la disfalon de la templo kaj de Jerusalemo, kaj Lition faras la trian fojon en tiu ĉi Evangelio (vidu: Lk.35; 19, 44). Tio signifas ke Liaj vortoj estas findecidaj; la plua kaj decida denunco de institucio kiu estis transforminta la lokon de la renkontiĝo de Dio kun Sia popolo en kavernon de rabistoj (vidu: Lk. 19, 46) devis utili al la disĉiploj kiel admono por ke ili malproksimiĝu de ĝi. Kiel oni povas pensi trovi la Sinjoron en medio kie superregas la ekspluatado de la mizeruloj por la avantaĝo kaj la privilegioj de la pastrita kasto? Kun Jesuo, kiu estas la videbla manifestiĝo de la amo de la Patro, de tiu Dio kiun eĉ ne la ĉielo povis enteni (vidu I Reĝoj 8, 27) nun loĝas en la homo kaj ne en ŝtonaj sanktejoj kiuj incitas al disigo kaj al flankenmeto inter la homamaso. Sekve, la defalo de la Templo ne devas esti komprenata kiel hazarda okazaĵo, sed kiel unu el la ĉefaj aspektoj de tiu eliro komencita de Jesuo pere de Liaj morto kaj Resurekto. La vojo de la Regno kiu estis malfermita per la anonco de la bona novaĵo devas esti libera de ĉiu malhelpo eĉ de la templo mem kiu povu malpermesi la plenan komunecon kun Dio. Tio kion oni vidas kiel la finon de iu institucio implicas la komencon de nova etapo en la historio, kiu estas tiu lasta kaj definitiva dum kiu la homaro paŝas al "nova ĉielo kaj al nova tero" (Apok. 21,1) kie la kreo de la Patro atingas sian efektivigon, ĉar "templon en ĝi mi ne vidis" (Apok. 21, 22). La akcepto kaj la praktikado de la instruado de Jesuo permesos la konstruadon de nova realaĵo kiu estos starigita sur la evangeliaj valoroj, kaj kapabla tiamaniere certigi la kreskon kaj la maturiĝon de ĉiu persono. Tia evoluo ne estos sendolora: Tiuj kiuj tenas la civilajn kaj religiajn povojn enmane vidante ke ilia pozicio estas

minacata kaj ke ilia defalo estas proksima, tuj ili reagos ekzilante kaj frapante la sekvantojn de la Kristo.

Tamen la persekutado eĉ pli evidentigos la malkoheron de la potenculoj kaj ĝi sin elmontros kiel faktoro de kreskado por la disĉiplo.

Sankta Luko volis substreki ke esti disĉiplo ne konsistas en konfeso de doktrino, sed en plenumo pere de la propra vivo de instruado kapabla realigi la planon de la Patro por la tuta homaro. Ne agnoski la tielnomatajn valorojn de la tradicio kiuj estas similaj en ĉiu socia grupo kiel estas tiuj bildigitaj pere de la "religio", de la "patrujo" kaj de la "familia klano", tio signifas altiri al si mem la malŝaton kaj la malamon de ĉiuj kiujn ili difinas, inkluzive eĉ de la familianoj. Samtempe Jesuo kuraĝigas Siajn disĉiplojn kaj ilin invitas havi la plej grandan fidon, asertante ke eĉ ne unu haro el ilia kapo pereos. Malgraŭ la detrua forto kiun la potenculoj kapablas uzi, estas garantiata al la disĉiploj ke eĉ ne la plej malgranda parto el ili estos detruita. Estas tiu la bona novaĵo kiu akompanas ilian ateston kaj ilian vivon je la servo de la Regno.

*Ricardo
Pérez Marquez*